



Atentinda dramartaĵo

Legi dramtekston estas iom malesperige, ĉar necesas bildigi al si la scenejon, la aspekton de la aktoroj, la sonon de iliaj voĉoj, la gestojn kaj esprimojn, kiuj realigas, kiel homon, la nomon sur la paĝo. Tial reĝisoro estas kvazaŭ dua aŭtoro, ĉar ŝi/li decidas, ĝuste kion vidos la spektantaro, donante vivon al la skribitaj vortoj.

Manke de rigardeblaĵo/aŭskultaĵo dramo ĉesas esti arto kaj fariĝas nur pseŭdoliteraturaĵo. (Mi devas escepti, kompreneble, kelkajn dramojn, neniam vere celitajn por enteatrigi.) Ĉi tiu dramo en presita formo riskas perdi sian esencon, ĉar la leganto devas esti samtempe reĝisoro kaj spektanto. Kiam oni raportas pri spektita dramo, onia raporto, tamen, estas tre subjektiva, kaj ĉiu spektanto komprenas ĝin propramane. Sed kiam oni nur legas nespektitan dramon, onia raporto nepre estas tiom subjektiva, ke ĝi valoras preskaŭ nenion. Tial mi ne volas taksi ĉi tiun dramon, ĉar mi scias, ke neniu du homoj sammaniere konceptos ĝin.

Temas pri preskaŭ sencesceneja scenaro, t.e. preskaŭ malplena ludloko. Da mebloj estas nur kvin tabloj. La leganto (kaj ankaŭ la spektanto) devas imagi por si mem, ke temas pri oficejo en ia komerca entrepreno. Da videblaj aktoroj estas seso; krome kelkfoje aŭdiĝas eksteraj voĉoj.

Preskaŭ ĉiu rolanto havas almenaŭ du apartajn nomojn. Spektante la dramon, oni sendube ne konfuziĝas pri tio, kiu diras/faras kion. Dum legado helpas skribi por si liston de la rolantoj kun la nomoj, kiujn ili pretendas por si. Preskaŭ senescepte la temo de la dramo estas la interrilatoj de la rolantoj. Eksteraj eventoj kelkfoje menciigatas, sed estas necentraĵo.

Krome, multe helpas almenaŭ dufoje tralegi la dramon. (Kaj, mi suspektas, du- aŭ pli-da-foje spekti la aktoratan dramon.) Ĉar eksplikoj plejparte mankas en la dialogo; kaj la agoj, eble eĉ pli precize la mienoj, de la aktoroj esprimas multon, kion ne klarigas la dialogo.

Ĉu iel eblus, ke la eldonisto metu viddiskon de la dramo enscenigita? Mi kredas, ke per tio multoble profitus la dramo.

La aŭtoro klare estas talenta. La dramo, laŭ sia maniero, estas kohera. Mi kredas, ke ĝi povus inde rangi apud la antaŭ nelonge eldonita viddisko de *La duonokulvitro* kaj tiel krei la fundamenton de vera dramarto esperantlingva.

Kritiketo necesas, ne pri la dramo, sed pri la presita teksto. Komposteraroj ĝenas kaj almenaŭ unufoje misgvidas la leganton. Abundas mankantaj akuzativoj, do ankaŭ ilin la leganto devas imagi por si mem.

Atentinda dramartaĵo.

Donald BROADRIBB

Anna Maria Dall'Olio: *Tabelo*. Eld. Edistudio, Pisa, 2006. 61 paĝoj, kudre bindita. ISBN 978-88-7036-074-5. Prezo ĉe FEL: 16,82 eŭroj + afranko.

Reen al:

[Ĉefpaĝo originala literaturo](#)